

Annette von Droste-Hülshoff,  
Kun bukedo de kampfloroj

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Kaj kvankam estas ŝtorma Maj',  
pluvegas kaj eĉ hajlas ĝi,  
ja tamen estas bela kaj  
ĝojiga unu tag' por mi.

Ja estas unu tago de  
ĉi aĉa Majo kara pli,  
ĉu brilas la ĉiel' aŭ ne,  
egalas tio ja al mi.

Ne povis ĝi deteni min,  
kampflorbukedon trovis mi,<sup>2</sup>  
kisante vin, mi donas ĝin  
kun tiu simpla kant' al vi.

*Traduko de la Germana poemo "Mit einem Feldblumenstrauß" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1991-05.*

*MR-244-2a / Arg-56-109 (2003-10-25 20:54:37)*

---

<sup>2</sup>aŭ: bukedon mian trovis mi,